„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria Esperantisto** „Kuraĝe antaŭen“

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

10a jaro. N-ro 8/9 Monata Aug.-sept. 1933

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ Ŝ 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Altbundeskanzler, Bundesminister für Heerwesen, General der Infanterie, Karl Vaugoin, Wien: „Es war ein guter Gedanke, die Versöhnung der Völker durch die Schaffung einer Weltsprache, des Esperanto, vorzubereiten. Zum Förderer dieser Weltsprache muß jeder werden, dem der Völkerfriede am Herzen liegt, nicht zuletzt der Soldat, ohne Unterschied der Nation, als der berufene Wahrer des Friedens.“

25. Aug 1933.

Die Bedeutung der Esperanto-Bewegung.

Von Bundesminister für Handel und Verkehr Fritz Stockinger.

Als sich der polnische Augenarzt Zamenhof vor beinahe 50 Jahren den Decknamen „Der Hoffende“ beilegte und damit das von ihm geschaffene Werk, die weltumspannende Bewegung des Esperanto selbst mit dem Ausdrucke des hoffnungsvollen Strebens benannte, mag er wohl gehofft, aber nie geahnt haben, welche Bedeutung seiner Schöpfung in einem halben Jahrhundert zukommen, daß sie tausende von Gruppen und hunderttausende von Menschen auf dem ganzen Erdkreis umfassen wird.

Wenn auch der Rundfunk, diese genialste Erfindung unseres Jahrhunderts, wie ein Band der Verständigung die Welt umschlingt, wenn auch die Aviatik in den letzten Tagen der Menschheit gezeigt hat, daß die Hilfsmittel moderner Technik den Erdball — man kann beinahe sagen — in Stunden zu umkreisen vermögen, so daß der Begriff der „Entfernung“ uns modernen Menschen zu fehlen scheint, eines entbehren die Völker der Erde noch, eine einheitliche, allen Menschen verständliche Sprache.

Wenn ich zur Bedeutung des Esperanto ein Wort sagen darf, so möchte ich hervorheben, daß die Vermischung des germanisch-romanischen Elementes dieser beiden Hauptgruppen der Weltsprachen unter Berücksichtigung des slawischen Idioms die Form einer Einheitssprache darstellt, die die zartesten Nationalgefühle schont und die ein Hilfsmittel der Verständigung in allen praktischen Dingen des Lebens, weit entfernt von jeder nationalen Politik, bildet.

Es war zweifellos eine „österreichische“ Tat, daß es der Führer unserer Esperantobewegung verstanden hat, das Internationale Esperanto-Museum in Wien zu errichten und unsere schöne Heimatstadt damit zu einem „Mekka“ der Anhänger ihrer Bewegung zu machen. Die hohe Bedeutung, welche dieser Schöpfung im Interesse des österreichischen Fremdenverkehrs zukommt, wird durch die Abhaltung der internationalen Konferenz zur Einführung des Esperanto in Handel und Verkehr und in den Schulen in Wien im Jahre 1934 noch wesentlich gesteigert werden. Unsere Stadt wird, wie so oft schon, wieder einmal zur internationalen Kongreßstadt werden.

Für die beiden weltberühmten Donaustädte Wien und Budapest, die durch Gefühle der Freundschaft und durch die gemeinsame Tradition verflossener Jahrhunderte verbunden sind, wird es eine große Ehre und ein volkswirtschaftlicher Gewinn sein, die Esperantisten der ganzen Welt in ihren Mauern zu begrüßen. Keine Bewegung ist so wie diese dazu geschaffen, den Ruhm unserer Hauptstadt in alle Welt zu tragen.

Aus diesem Grunde allein schon ergreife ich gerne die Gelegenheit, mit diesen Zeilen Ihre Bewegung auf das herzlichste zu begrüßen und Ihrer bevorstehenden Tagung den vollsten Erfolg zu wünschen, da ich Ihre ganze internationale Aktion nur als eine „vaterländische“ Tat bezeichnen kann. Selbst dem Kaufmannsstande entsprossen, weiß ich die Bedeutung Ihrer Bestrebungen und ihre Auswirkungen auf die Welt-Handelspolitik wohl zu schätzen, da ich mir dessen bewußt bin, daß eine gemeinsame Weltsprache auch

eine internationale Verständigung in den Wirtschaftsbeziehungen der Welt nach sich ziehen würde.

So danke ich denn Ihren führenden Männern für ihre Tätigkeit im Interesse unserer Heimat und unseres schönen Wien und wünsche Ihrer Bewegung aus vollem Herzen Blühen und Gedeihen. Hoffentlich wird auch bald Ihre Sprache den Erdkreis umspannen, ein Ziel, das sie sicher erreichen werden, wenn Sie sie nur der Dichterworte ihres Gründers:

„Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
vi iru la vojon celitan!"

stets eingedenk sein werden.

5. Aug. 1933.

Nia jubilea kongreso.

Köln, 29. julio— 6. aŭg.

Sabate: Je la 10 h **kunsido de ICK kun LKK**, je la 11 h **kunsido de KR**. Je 15 h **jarkunveno de Germana E.-Asocio** (GEA) kun la ĉefa temo »egaldirektigo« de GEA laŭ la novaj principoj, regantaj en Germanujo. Ĉeestis pksm. 300 pers. Prez. la ĝisnuna prez. poŝtkons. Behrendt, kiu ankaŭ estis elektita »gvidanto de GEA«. Behrendt vokas en la Gvidul-konsilantaron, kiu de nun anstataŭos la estraron, d-ron Vogt, Markau, Naumann kaj prof. Schmalzl.

Interkonatiĝa vespero.

Dimanĉe: Diservoj. Katolika en preĝejo Sa. Andreo el la 13. jc., kie s-ano pastro Wachowski predikis pri la universaleco de la Katolika Eklezio. Samtempe en salono de »Evangelisches Vereinshaus« pastro W. Koopmann el Geseke (Westphalen) predikis pri »la ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon el la mondo«.

Malferma kunsido. Ĝi okazis en la mezepoka salonego de la 500-jara Gürzenich, kiu jam vidis en siaj haloj imperiestrojn, armeestrojn, sciencistojn, urbestrojn ktp. Sed neniam la respektinda Gürzenich vidis kiel nun homojn el 32 nacioj el la plej diversaj monddirektoj, el ĉiuj kontinentoj, parolantaj unu lingvon. Akurate 10[45] h la pordoj estis fermataj, eksonis fajfiloj kaj tamburoj kaj estis enportata nova, bela E-standardo de »Kolonjaj Tramistoj«. La orgeno ludis po unu strofo de la germanaj naciaj himnoj, dum kiuj la publiko ekstaris kaj multaj braklevis laŭ la nova germana kutimo. **S-ro Warnier**, prezidinto de 24. Univ. Kongreso de E en Paris, malfermas la Jubilean Kongreson kaj atentigas pri la grandaj malfacilaĵoj, kiujn devis venki LLK. Sed ĝi sukcesis per bonvolo kaj optimismo. Li rakontas anekdoton pri pesimismo kaj optimismo. Vidante hotelon duone plenan, pesimismo veplendas: »Ho, la hotelo estas nur duone plena!«, sed optimisto ĝoje ekkrias: »Jen, ĝi estas jam duone plena!« Ni esp-istoj estu ĉiam optimistoj — nur tiel ni venkos.

Sro Warnier proponas: prez. de 25-a la gvidanto de GEA, poŝtkons. **Behrendt**, vicprez. s-ino **Gernsbacher** kaj sro **Markau** (germanoj) krome aliaj el la diversaj nacioj, ĝen. sekr.-**Kreuz**, sekr.-**Wingen**, vicsekr.-**Schumacher.**

Prez. Behrendt salutas la konsulojn de la eksterlandaj registaroj, dankas al la urbestraro, memoras la mortintojn.

Sekvas **prologo de J. Baghy** parolata de 12-jara Marianne Schneider-Köln.

Dro Vogt, anstataŭante sron Merchant, salutas nome de ICK.

Por la diplomata korpuso de Köln parolas la ĝen. konsulo de Belgujo **Petremont** francelingve, por saluti la kongreson. (Laŭ peto de AEA la aŭstria ministerio por ekstero sendis la ĝen. kons. en Köln al la Malfermo kaj disponigis ankaŭ aŭstrian flagon).

Fama organisto **prof. Bachem** ĝojkantigas la orgenon.

Prez. Behrendt leviĝas por sia festparolado: » . . . . fine la mondo ekkonu, ke E efektive estas praktikata. Kvankam nur 1000 esp. el 32 landoj partoprenas, ili ne nur interkompreniĝas lingve, sed ankaŭ spirite. Per la uzado de la mondhelplingvo la gepatraj lingvoj ne nur ne suferas ian malutilon, sed estas pli bone ekkonataj kaj estimataj; tio kaŭzas, ke esp. speciale amas sian gepatran lingvon apud la helplingvo . . . la profunda senco de l' E-movado estas la postulo je rait-egaleco sur lingva kampo. Kompreneble oni povas uzi E-on por bonaj kaj malbonaj celoj, same kiel la presarton. Oni ne preterv idu, ke ankaŭ E servas por informi fremdajn landojn pri enlandaj cirkonstancoj. La nuna kongreso prezentas plej bonan okazon, por ekkoni Germanujon per propraj okuloj kaj oreloj, kia ĝi vere estas. Parolata de vivantaj homoj E prave devas esti konsiderata kiel vivanta, ne miru pri la rajtoj kaj devoj de tia. Tia lingvo kun ĉiuj konstante kreskanta literaturo. La mezepoka latino almenaŭ sammezure estis artefarita kiel E kaj ankaŭ tiu estis konsiderata kiel plenvalora. Pri E oni ne parolu, nenion sciante pri ĝi. (Sekvis vortoj pri la historio de Köln) . . . fidu, ke la nuna gvidanto de Germanujo, Adolf Hitler, sincere estas konstruanta novan ŝtaton, kiu montru al la aliaj popoloj, ke ree valoros interrilati kun Germanujo ekonomie kaj komerce.

Dro Vogt salutas la ĉefurbestron de Köln, dron Riesen.

Der Katholische Schulverein veranstaltet im Herbst 1933 Abendkurse für Erwachsene, unter diesen auch Kurse für Esperanto. Anmeldungen an Kath. Schulverein, Wien, I, Stefansplatz 6 (Aus. „Der Weckruf")

Esperanto-Kurse

für **Anfänger** Montag und Mittwoch, für **Fortgeschrittene** Dienstag, jedesmal von 20-22 h erteilt Regierungsrat Steiner, Wien, I, Neue Burg (Tel R27-803), Esperanto-Museum. Dauer 4 Monate; Kursbeitrag S 10.—. Anmeldungen bis 25. September. Beginn: Anfang Oktober. Die Angemeldeten werden hievon rechtzeitig verständigt.

Dro Riesen parolis germane. Li esprimas sian ĝojon pri tio, ke reprezentantoj de 32 nacioj nun havas okazon informiĝi pri la faktaj cirkonstancoj en Germanujo. La tuta germana popolo honeste celas, per laboro kaj diligenteco konstrui vivkapablan ŝtaton, La nacisocialista revolucio devis veni, por gardi la mondon kontraŭ la bolŝevismo. Fine la ĉefurbestro petis, ke la eksterlandaj gastoj, revenintehejmen, rakontu laŭvere pri tio, kion ili vidis kaj spertis en la nova Germanujo.

Kreuz tradukis la paroladon.

Prez. Stettler salutis nome de UEA, memorigas pri la 25-jara jubileo de UEA kaj invitas, viziti la aranĝojn de UEA. Li finis, ke UEA venis ĉi tien kun la bona volo trovi interkonsenton.

Sekvis alparoladoj de la **naciaj reprezentantoj.**

Fine Kreuz legis telegramon de familio Zamenhof.

Malfermo de „Somera Universitato".

Prezidis prof. d-ro **Giorgio Canuto.** Prof. d-ro **Perrenoud** el Neuchâtel, kiu devis fari la unuan prelegon, telegrafis, ke li ne povos veni. D-ro Comm. **Angeli Muturelli** el Salerno, italujo, kiu devis prelegi pri »Publikaj verkoj de la faŝismo sur kampo de arkitekturo« kaj pri »Verkoj de la moderna itala tekniko«, ankaŭ ne povis veni. Restis nur 2 prelegontoj por la sekvintaj tagoj (**d-ro Vogt** kaj **prof. Collinson**).

Literatura Vespero kaj **iluminado.**

Literatura Mondo rezignis la aranĝon kaj nur en la lasta momento s-anino **Landau,** iama aktorino, sindone klopodis instrui al kelkaj diletantoj parolĥorojn kaj mem reciti poemojn. Granda aplaŭdo dankis la prezentantojn.

Poste **iluminado** de la Rhein-bordo kaj de la katedralo. Belega aspekto.

Lunde: Al la tramistoj ne estis permesata porti brakrubandon kun »Esperanto« per ia reskripto, kvankam la rubandoj estis jam preparitaj.

1. Laborkunsido. Prez. **Behrendt** malfermas. Salutas **Sattler** el Philippeville nome de la afrikaj esp-istoj, **Hub** nome de Germana E.-As. en ĈSR. **Isbrücker** aldonas, ke li ĉeestas la kongreson kiel oficiala reprezentanto de la nederlanda registaro. **Kreuz** legas la nomojn de saluttelegrafintoj. Prez. **Behrendt** devis foriri, anstataŭas lin d-ro **Vogt.**

Kreuz, direktoro de ICK, salutas nome de s-ro Merchant, kiu skribis, ke li tamen spirite ĉeestas kaj salutas ĉiujn kore kaj sincere. (Iu proponas sendi al li telegramon, akceptata). Raportante pri ICK la dir. diras, ke la pasinta jaro estis la plej malfacila ĝis nun. Sed konsciante pri nia respondeco, ni faris kion ni povis. Parolas pri E.-movado en diversaj landoj kaj kontinentoj, menciis la eldonojn de oficialaj poŝtkartoj kun E.-teksto en Hungarujo kaj Liechtenstein kaj petas, ke oni pli multe ol ĝis nun subtenu tiujn entreprenojn. (Pri financoj, Radio // en 1932 okazis 2308 Radio-dissendoj en aŭ pri E. //, ŝlosiloj // nun en 26 lingvoj // ktp. oni relegu en la oficiala Raportaro.) Dir. Kreuz finis per peto al ĉiuj, ke ili helpu, por ke E.-fariĝu reala faktoro de la internacia interkompreniĝo. (Aplaŭdoj.)

D-ro **Vogt:** »Via aplaŭdo estas la signo de elkora danko al la direktoro de ICK. Mi deziregas kaj esperegas, ke en sekvontaj kongresoj ni aŭdos jam nur unu raporton de unu unueca organizaĵo«. Fino 11 h.

Fakkunsidoj de Kristana Ligo, de juristoj, pri Radio, renkonto de Rotarianoj kaj de diversaj komitatoj (Akademio, LK, KR, ICK, UFE, UEA).

En la **Somera Universitato** prelegis bankisto d-ro **Vogt,** Stuttgart, pri »Financa krizo kaj ĝiaj originoj«. Tre interesa kaj aktuala temo.

Filmo pri 24. Univ. Kongreso en Paris estis prezentata de **J. Ravestein.** Kvankam nur estis amatora filmo, ĝi trovis grandan intereson kaj multan aplaŭdon.

Filmo pri Stockholm, la kongresurbo de 26-a Univ. Kongreso en 1934, estis montrata de **Einar Dahl** el Uddevalla.

La **„suprizo por kongresanoj frupagintaj sian kotizon".** Tiel staris en la kongreslibro. »Renkonto sub Hohenzollern-ponto, atentu la flagojn!« Kaj la surprizo: senpaga veturigo de la frualiĝintoj sur Rhein-ŝipo dum kelkaj vesperhoroj. La agrabla surprizo bonege plaĉis!

Marde: Dua Laborkunsido. Jungfer raportas pri E. en sfero de Radio, donas informojn kaj konsilojn.

Dir. **Kreuz** raportas anstataŭ red. Avril pri Gazetara Servo, kiu pro manko de financoj en la pasinta jaro ne estis grava, sed esperinde ni povos repreni ĝin.

Behrendt atentigas, ke niaj plej gravaj agadkampoj estas Radio kaj gazetaro. Sed ofte malhelpas la indiferenteco de l'samideanoj. Malpli gravas la metodo, sed gravas la rezultoj. Zorgu do, ke ICK baldaŭ ricevu informojn pri rezultoj! Post la Jubilea Kongreso komenciĝu vigla laboro.

D-ro **Vogt** dankas pro la laboro de Avril.

Aron petas la germanajn samideanojn, kiuj havas rilatojn al la nacisocialista partio aŭ gazetaro, ke ili agu tie.

Behrendt akcentas, ke tio estas interna germana afero; mencias klarigan libron, disponigitan en centoj da ekzempleroj de la germana Ministerio de Propagando; alilandaj s-anoj prenu ĝin hejmen kaj poste skribu al siaj germanaj konatoj aŭ rekte al la oficialaj instancoj pri siaj propraj observoj.

Sekr.-kas. de KR **Schoofs** raportas pri la financoj de KR. Bona rezulto. Li dankas la naciajn societojn, la gvidantojn de ICK kaj UEA, precipe la direktorojn Kreuz kaj Jakob, kiujn ni esperas ankoraŭ multajn jarojn vidi laborantaj man' en mano. — Tiu ĉi raporto estas kvazaŭ la „cigna kanto" de KR. Li esperas, ke antaŭ fino de la kongreso ni havos definitivan interkonsenton.

Behrendt esprimas sinceran dankon al Schoofs pro lia konstanta kaj persista laboro. Post la morto de KR, lia KR(koro) batu ankoraŭ longtempe por nia movado.

Rousseau, anstataŭanto de l' prez. de Akademio kaj LK, resignas pri la raporto, ĉar presita en Raportaro.

Behrendt: „Post la morto de prez. Warden s-ro Rollet de l'Isle fariĝis prezidanto de la Esperantista Akademio." (Aplaŭdo.)

Dahl invitas aliĝi al la 26-a.

Dir. **Kreuz**: „Ni devas nin bazi sur via simpatio, sur via kunlaboro. Viaj simpatio kaj kunlaboro estas al ni bezonaj? Do, helpu al ni, laŭ maniero celkonscia kaj praktika." Fino.

Fakkunsidoj de bahaanoj, Int. Scienca Asocio, germanaj instruistoj, Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esp., poŝtistoj, blinduloj, stenografoj kaj la kutimaj komitat-kunsidoj.

Rejnlanda Vespero: Kolonja karnavalo, aranĝita de la prezidanto de la plej fama „Grosse Kölner Karnevals-Gesellschaft" Fritz Maass, bone sukcesis kaj restos ĉiama agrabla rememorajo al ĉiuj partoprenintoj.

Merkrede: La tago de UEA.

Okaze de la jubileo de sia 25-jara ekzistado UEA (la malnova UEA laŭ novaj principoj) estas rekonstruita, aŭ almenaŭ la bazo por rekonstruado estas fondita. Se ĉiu de nun laboros saĝe kaj interkonsente, ni post kelkaj jaroj vere povos havi tian UEA, kian Heroldo jam en sia artikolo en 1920 imagis: Torenton, kiu triumfe inundos la mondon, forŝirante ĉiujn barojn kaj kondukante nian aferon al baldaŭa fina venko.

La festkunsido: La meritplena prezidanto de UEA **Stettler** malfermas.

S-ino **Gernsbacher** nome de LKK ĝojas, ke en la kadro de la Jubilea Kongreso ni festas ankaŭ la jubileon de UEA.

D-ro **Vogt** (por ICK) diras plej korajn bondezirojn. ICK estas preta „doni sian vivon", por ke UEA estonte vivu des pli sekure.

Schoofs aldonas la gratulojn de la naciaj societoj.

Vicprez. de UEA **Karsch** legas la nomojn de sendintoj de gratulleteroj.

Festparolado de prez. **Stettler**: „Karaj samideanoj! Kun granda emocio mi staras antaŭ vi, dankante al la sorto, kiu permesis al ni festi la hodiaŭan jubileon. 25 jaroj ne estas longa tempo por asocio, kiu volas alporti novan senton al la mondo. Oratoro donas resumon pri la ekesto kaj historio de UEA, kies celo estas la praktika utiligo de E. La junaj esp-istoj kredu je la estonteco. Li diras laŭdojn kaj dankojn al la direktoro de UEA Jacob (aplaŭdoj), dankas al ĉiuj kunlaborintoj en aŭ por UEA, mencias la klopodojn por novorganizo kaj finas per la vortoj de svisa poeto Gottfried Keller: „La patrujon de ĉiu estimu, la vian amu!"

Vicprez. Karsch dankas al li kaj citas la nomojn de 35 novaj honoraj membroj:

1. Pro merito al Esperanto ĝenerale:

Dro Heinrich Arnhold, Dresden (Pioniro en Germanujo,
André Baudet, Paris (Komerca Ĉambro kaj Foiro, Paris)
Andreo Cseh, Haag (Grandstila instruado kaj varbado)
Julia Isbrücker, Haag (Gvido de Cseh-Instituto)
William M. Page, Edinburgh (Pioniro en Skotlando)
Dro Augustin Pitlik, Praha (Sukcesa laboro ĉe registaro)
Dro Anakreon Stamatiadis, Athen (Pioniro en Greklando)
Hugo Steiner reg.-kons., Wien (Fondo de Int. Esp.-Muzeo)
Dro Eugen Wüster, Berlin (Vortaro enciklopedia Esp.-Germ.)

2. Pro merito pri UEA:

Henry W. Hetzel, Philadelphia
Rudolf Hromada, Praha
J. R. G. Isbrücker, Haag
Johannes Karsch, Dresden
Vilho Setälä, Helsinski
Otto Sklenĉka, Hradec Kralové
Charles H. Briggs, Mineapolis
Oskar Bünemann, Hamburg
Prof. dro Christaller, Stuttgart
Theodor Ĉejka, Bystrice Hostyn
Emil Gasse, Le Havre
Gabrielle Gérard, Paris
F. A. Goodliffe, Horsam
Paul Gottgetreu, Hannover
Albert E. Hepton, Hull
F. W. Hipsley, Wolverhampton
William H. Hirst, Huddersfield
Hermann Kürsteiner, St. Gallen
M. Magnus-Focké, Orleans
Auguste Martin, Macon
Dro Heinrich Orthal, Nürnberg
Donald E. Parrish, Buffalo
Marthe Petit, Dijon
Augustin Ploussu, Grenoble
Julia Supichova, Praha
Hans Tressel, München

Nome de la honoritaj dankas inĝ. **Isbrücker**.

Du altmeritaj pioniroj de UEA, **Blaise kaj Rockmann**, ricevas ledan aktujon; por dir. **Jakob** estas destinata ses-voluma grava verko, kiun li delonge deziris posedi.

Fine sekvis tute speciala honorigo al prez. Stettler per poemo de K. Kalocsay, laŭtlegata de Telling.

Vendrede: 3. Laborkunsido. Prez. **Behrendt**.

Kreuz pri „La organizo de naciaj centroj". „Ni estas proksime al la delonge dezirita reorganizo". Lia alvoko al ĉiuj: „Helpi al la oficialaj instancoj en ilia laboro. Kreo de agemaj centroj en ĉiu lando necesa. Ni bezonas ĉiuflankan subtenon kaj ankaŭ monon por regula laboro." Pri 2. punkto „La sekurigo de sukcesoj atingitaj por nia lingvo": Ofte la atingitaj sukcesoj — ankaŭ sen-

saciaj — neniiĝas dank al neuzo de la ŝancoj. Ekzistas du specoj de laboro: 1. la **okaza** ekz. ĉe internaciaj kongresoj, por atingi rekonon de E — tiu laboro povas havi bonan **rezulton**, se ni zorgas, ke tia rekono restu ne nur surpapera; 2 la **preparita** laboro, kiu nepre garantias sukceson, se ni adaptiĝas al la kampo, kiun ni prilaboras. Unue studi ĉiujn detalojn, poste interrilati kun la koncernaj institucioj ktp. kaj adaptiĝi al la cirkonstancoj Sukceso nur estos per sistema, praktika laboro. Vi ne estu nur propagandisto, sed fariĝu necesa helpanto de la koncernaj institucioj ktp.; en tio troviĝas la sekreto, le sekurigo de sukceso por nia afero. Por la Hungara Poŝto oni laboris kvin jarojn, por fine atingi sukceson.

Inouye salutas nome de Japana E.-Instituto. Japanoj bone sentas la neceso de internacia lingvo. La registaro estas favora.

Robertson: Por sekurigo de sukceso necesas disciplino.

Schoofs: „Ni marŝas sur la loko de 20 jaroj, ni havas la aparaton, ni funkciigas ĝin — sed por kiu celo? Nur por diletanti la Esperantismon Uzanto de telefono aŭ aŭtomobilo ne uzas ĝin pro ĝia boneco aŭ beleco, sed por praktika celo. Oni devas uzi E-on ekster la E-vivo. Jen la konsilo, kiun mi povas doni al vi."

Diskutas: Dahl, Koopmann, Berger, Coufinhal, Schoofs, Behrendt, Naumann, Cramers, Midas

Posttagmeze: Vizitoj al industriaj entreprenoj kaj al la flughaveno.

Vespere: Fakkunsidoj. Vespero de la blinduloj.

La **Bankedo** kaj la **Internacia Balo.** Partoprenis la bankedon 300 personoj; tostis dro Vogt, donante la ĝojigan informon, ke nun fine **plena interkonsento** estas atingata; tostis Schoofs por la virinoj. Poste oni iris al la balo, kiu daŭris ĝis krepusko de

Sabato: ferma kunsido, vizitita multnombre kiel neniam en antaŭaj kongresoj.

Behrendt proponas danki al Ministerio de Instruado en Madrid.

Kreuz legas rezoluciojn, por esprimi simpation al la Hungara Ministerio Poŝta pro eldono de oficialaj poŝtkartoj kun E.-teksto, kaj same al la registaro de Liechtenstein.

Dro Vogt, anstataŭanto de prez. de iama ICK, **Merchant:** Por pritaksi la sukceson de la Jubilea Kongreso mi mencias la ĉeeston amasan dum ĉi tiu ferma kunsido, pruvo, ke dum la kongreso oni ne nur amuziĝis, sed multe laboris. La kongreso havis duoblan jubilean karakteron pro la jubileo de UEA. Kaj oni atingis celon, por kiu oni batalis jam dek jarojn: unuigi la movadon, forigi la dualismon, la du vojojn. **Nun ni marŝos sur unu vojo,** kaj la esp-istaro en la tuta mondo devos subteni siajn gvidantojn. Ĝis nun la E-movado suferis pro nesufiĉaj rimedoj. Sed, se la esp-istaro scias, ke ĝiaj rimedoj estos uzataj ĉie je la ĝusta loko, ĝi pli volonte donacos. **Ni promesas, de nun en nia movado oni laboros laŭcele.** En kelkaj jaroj ni vidos, kiom bonegan efikon havis nia decido. Vi estu atestantoj de la granda momento. kiam oni subskribas la **Interkonsenton de Kolonjo.**

Schoofs legas la tekston de la dokumento, kiu havas la titolon „Unuecigo de la Esperanto-Movado, Interkonsento de Kolonjo". Nun subskribs (jam subskribitan de Stettler, kiu devis forvojaĝi), Karsch, Robertson, Goldsmith, Behrendt, Bastien Petit, Baas, Isbrücker, Dahl, Clavenna, Inouye, De Ketelaere, Maeder, Meyer, Blaise kaj Münz (por UEA), Thomas, Schmalzl, Alberich Jakob (aplaŭdego), Kreuz (same aplaŭdego) ktp. La **du direktoroj, Jakob kaj Kreuz, donas al si reciproke la manon super la dokumento.**

Estis grava momento, ne baldaŭ forgesebla por ĉiuj, kiuj ĝin ĉeestis.

Behrendt: Bonvolu atente memori, kaj la tuta esp-istaro aŭskultu, ke **de nun la E-movado jam marŝas nur sur unu vojo.**

Dro Vogt: Ni subskribis per ĉiuj esperoj kaj deziroj, kiujn homoj povas havi por kultura celo. **Mortis la reĝo, vivu la reĝo! Mortis KR, mortis ICK, vivu UEA!** Dankon al sro Merchant, kiu ne povas ĉeesti. Celconscie li gvidis nian movadon dum jaroj. Ni telegrafu al li, ke lia verko estas kronita!

Sed antaŭ ol ICK mortas, ĝi dankesprimas al kelkaj fidelaj laborantoj per dediĉo de **medalo** al:

sro **Schoofs**, bonega laboranto kaj vera homo fidela amiko de nia afero kaj al neĉeestantaj

redaktoro **Nylen** kaj

sro **Steiner**, la fondinto de Internacia Esp-Muzeo en Vieno.

Oratoro dankas al LKK „pro aranĝo de kongreso, kian mi ne jam vidis", precipe al la estrino de LKK s-ino Gernsbacher kaj sekr. Wingen. Fine: „ICK mortis." (Aplaŭdo).

Behrendt: Tio estis eble la unua fojo, ke oni aplaŭdis pro morto.

Schoofs dankas pro la signo de simpatio, kiun oni montris al li kaj la du neĉeestantoj per dediĉo de honormedalo. — En la komenco de la kongreso ni promesis atingi la unuecigon. Jen la fakto. Ni (la antaŭa KR) faras nian devon, sendante al vi nian funebran saluton kaj petante, ke vi preĝu por ĝia animo (Ridado).

Vicprez. **Karsch:** Dum la lastaj jaroj la E-vetero estis ofte nuba. De nun la suno brilu! UEA laboros celkonscie kun la naciaj societoj!

S-ino **Gernsbacher** dankas nome de LKK, **Behrendt** nome de la kongreso kaj **Petit** en la nomo de la alilandanoj.

Isbrücker invitas al vizito de E-domo en Arnhem, Dahl al 26-a en Stockholm.

Prez. **Behrendt:** „Fratoj, manojn donu kore! Kaj ofte rememoru la tagojn de Kolonjo! Ĝis revido en Stockholm!"

Schoofs dankas al ambaŭ **prezidantoj** Behrendt kaj Vogt. — — —

Ni ĉiuj, ankaŭ la neĉeestintaj aŭstrianoj, ĝoju pri la bonega sukceso de la Jubileaj Kongresoj en Köln kaj ankaŭ voku: „Fratoj, manojn donu kore!“ Steiner.

Ĝenevo, 24. aŭgusto 1933.

Sro Registara Konsilisto
Hugo Steiner
Prezidanto de la Internacia
Esperanto-Muzeo
Wien.

Estimata, ŝatata samideano kaj prezidanto,

Ni sincere bedaŭras, ke certaj politikaj cirkonstancoj ne permesis al vi ĉeesti la 25-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kolonjo, kiu fidele al sia rolo, kiel Jubilea Kongreso, fariĝis ununura sukceso. Ni bedaŭras vian foreston speciale pro tio, ĉar ni estus nepre ŝatintaj vin saluti en la ferma kunsido, kiu solene festis la meriton de niaj eminentaj pioniroj.

Pro tio restas al ni nur la ebleco, letere esprimi al vi, en la nomo de la tuta esperantistaro, nian admiron kaj sinceran, koran dankon pro via grandega servado al Esperanto kaj pro via fidela defendado multjara de nia komuna idealo.

Estas granda honoro kaj plezuro por ni, informi vin, ke la membroj de nia komitato decidis, laŭ interkonsento kun la Aŭstria Esperanto Asocio, distingi vin per la honormedalo de la Internacia Centra Komitato. Ni estas konvinkitaj pri tio, ke distingante vin per transdono de tiu ĉi nur malofte disdonata honorsigno, ni agas en plena interkonsento kun ĉiuj esperantistoj, kiuj konas vian agadon por Esperanto. Ne estas eble al ni, mencii en tiu ĉi skribaĵo eĉ nur la ĉefajn sukcesojn, kiujn vi atingis. La plej elstara nekontesteble estas tiu de la fondo de la Internacia Eperanto Muzeo. Ĝiaj historio kaj ekzisto ligos vian nomon intime al la Esperanto-movado por ĉiuj tempoj kaj sendube reprezentas la kronadon de via klopodo.

Ni do petas vin akcepti la medalon, kiel modestan eksteran signon de nia rekonemo. Nerekte, ĝi ankaŭ peradas la dankon al la oficialaj institucioj en Aŭstrio, kiuj tiel kompreneme subtenis kaj akcelis vian agadon. Gardu en via interno la nekompenseblan konvinkon kaj senton de kontentiĝo, ke vi laboris por granda kaj helpinda ideo. Bonvolu ankaŭ konservi al ni kaj nia movado ankoraŭ longatempe vian viglecon kaj energion, kies fruktoj igas nin viaj admirantoj.

Ni estas tre ŝatintaj persone transdoni al vi la medalon en Kolonjo. Pro via neveno, ni povis ĝin nur sendi al vi per poŝto.

Sendante al vi niajn sincerajn bondezirojn por vi mem kaj via plua laborado, ni petas vin, tre estimata, ŝatata samideano kaj prezidanto, akcepti la esprimon de niaj plej samideanaj sentoj kaj de nia perfekta simpatio.

Internacia Centra Komitato
de la Esperanto-Movado

John Merchant Robert Kreuz
prezidanto direktoro

Köln am Rhein, 2an de Aŭgusto 1933.

Sro Regierungsrat Hugo Steiner
N-ro 33/1190. Wien.

Altestimata samideano,

Estas por ni granda plezuro informi vin, ke la 19-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Köln akceptis kun forta aplaŭdo proponon de la komitato nomi vin:

Honoran Membron de la Asocio,

pro via senlaca fervoro, malegoista oferemo kaj sindona preteco servi al la granda idealo de nia majstro kaj de la fondintoj de nia Asocio Meze en la ĝenerala malcerteco, firme staris nia Asocio kaj staros same firme, se ĝin gvidas la spirito de reciproka servado, de helpemo kaj de bonvolo montrita de vi dum via longa partopreno en la movado. Viaj meritoj por la movado ne estu forgesataj kaj vi mem estu ekzemplo por la novaj samideanoj, plenigontaj la vicojn liberajn.

Sincere bedaŭrante, ke ni ne havis okazon saluti kaj bonvenigi vin dum nia jara festo, ni petas vin akcepti niajn sincerajn bondezirojn kaj samideanajn salutojn.

Universala Esperanto-Asocio

La prezidanto: La Vicprezidanto:
Ed. Stettler, p. m. Johann Karsch, m. p.
Direktoro:
Hans Jakob, m. p.

(El „La Pirato“-Paris, kajeroj por Satiro, Humoro kaj Libereco. . .)

Unika Dokumento.

La geedziĝo de UFE kaj UEA.

La jubilea paro **Hans Jakob—Kreuz** post la ceremonio Kolonjo.

(Jakob kiel juna homo kaj Kreuz kiel junedzino — vere interesa bildo!)

Poste la strofo:

Post regluo kaj riparo
Tiu ĉi feliĉa paro
Ĵus retrovis ĝoje-danke
Siajn pramalnovajn amojn,
Sed ĝi perdis alifianke
Preskaŭ tricent kilogramojn!

Iu, kiu perdis sian tempon.

Estas s-ro Steiner, kiu reprezentis en Genevo ne nur la Aŭstrian Societon kaj la Aŭstrian Fervojon sed ankaŭ kaj ĉefe la Esperantan Muzeon. Li venis por kolekti kelkajn „malofaĵojn“ por la muzeo. La etiketoj, kiujn li estis preparinta jam antaŭe, lasis neniun dubon pri liaj intencoj. Sur unu oni legis „Okulvitroj de s-ro Stettler“, sur aliaj „Kolumo de sro Hans Jakob“, „Kompleta dentaro de s-ro Kreuz“, „Ĉemisbutono de s-ro Dubois“, „Nazopinto de s-ro Goldsmith“ . . Bedaŭrinde ĉio aranĝiĝis kaj s-ro Steiner hejmenveturis kun malplenaj manoj.

Al niaj pioniroj Nylen kaj Schoofs.

Kun vera ĝojo ni aŭdis pri la honorigo de vi, karaj pioniroj de nia movado, kaj ni deziras esprimi al vi nian koran gratulon kaj dankon pro la multflankaj servoj, kiujn vi dum multaj jaroj faris al nia movado.

Sekvu nian deziron, vivi ankoraŭ multajn jarojn pro la bono de nia afero!

IEMW. AEA.

Esperantista Akademio kaj ties Lingva Komitato.

Post la morto de prez. Warden la meritplena pioniro de nia movado s-ro Rollet de l'Isle-Paris estis elektata prezidanto. Ni vere ĝojas kaj kore gratulas la novan prez., kiu ankaŭ estas Honoro Membro de IEMW.

Int. Esperanto Muzeo en Wien

Wien, I. Neue Burg, Heldenplatz.
Telefono n-ro R 27-803

Malfermata labortage 9—12, 15—18 h; sabate 9—12 h.

Internacia Honora Komitato:
Aŭstrio:
Kanceliero dro Engelbert **Dollfuss**
Internacia Kuratora Komitato:
Sudafriko:
Andrew, S. A., Claremont.

Dumvivaj membroj (Aŭstrio S 15.—; alilandaro egalvaloro de svis. fr. 12.50; event. en 3 partpagoj):

496. Faraker F., Sidney, Aŭstralio; 497. Ekengren, J. O., ferv. Kiruna, Sved.; 498. Wagnleitner Anton, ferv., Wels; 499. Kierner Josef, ferv., Wels; 500. Silberstein dro Karl, Kielce, Pol.; 501 Kirchner P. Aegid. prof. Lienz, Tirol; 502. Collinson, W. E., univ. prof. Liverpool; 503. Franz Karl, supera ofic., Wels; 504. Haccou C. A. A., admin. de pruntbanko Soerabaja, Nederl. Hindujo; 505. Karl Aloisia, iama instr., Tulln; 506. Scherer Joseph R., Los Angeles, Calif.; 507. Dauge Emil, Berlin-Lichterfelde; 508. Sergeant Lucien, Boulogne s. M.; 509. Sergeant Alice, Boulogne s. M. Franc; 510. Andrew S. A., Claremont, Sudafriko; 511. Teders G., Haarlem, Nederl.; 512. Baldwin Smith, Ella, Barry, Kimrujo; 513. Langstone, Adeline, Barry; 514. Kun dro Leo, red. de „La suda Stelo". Brod u/S, Jugoslav.; 515. Hamaker C. M., Hilversum, Nederl.; 516. Mallinger Herbert, fervojof., Wels.

De la Aŭstriaj fervojoj:

Aperis jena reskripto:
G. D. Zl. 1 8/8 aus 1933.
An alle Bundesbahndirektionen.

Infolge der verhältnismässig grossen Anzahl vorhandener Esperanto sprechender Schaffner besteht für längere Zeit kein Bedürfnis Personenzugschaffner mit Esperanto-Kenntnissen heranzuziehen.

Um nun dem Einzelnen unnötige Auslagen für Kurse, Behelfe u. dgl. zu ersparen, geben wir bekannt, dass in Abänderung der D. A. vom 18. Mai 1932, GDZ. 1421/30, bis auf weiteres wohl die vorgeschriebenen Nachprüfungen, jedoch **keine Prüfungen mehr aus** Esperanto abgenommen werden.

Wien, am 16. Mai 1933. Ing. Nouackh, e.h.

Nia prezidanto tuj interrilatiĝis kun s-ro direkt. Ing. Noackh kaj tiu diris, ke la ĝeneraldirekcio ne estas kontraŭ E. sed ĝi devis nunmomente agi tiel, ĉar tro multaj fervojistoj lernis E.-on kaj ne la aliajn lingvojn, kiujn oni ankaŭ bezonas por la interrilato kun la fremduloj. Se ekz. estus tro da france scipovantoj, oni ankaŭ por certa tempo ne allasus tiujn al novekzameno. La ĉiujara ripetekzameno kompreneble okazos ankaŭ pri Esp.

Atentu!

Radio „Tour Eiffel": 23. sept. 15.15-15.30 h prelego en Esp. „Elbeuf, urbo de la Drapo-Industrio". Sendu karton al G. Saget, del. Elbeuf, (Seine-Inf.), Franz.

Foiro de Reichenberg, ĈSR, eldonis por sia aŭtunfoiro (12.—18. VIII.) belajn sigelmarkojn.

Aŭstria Esperanto-Asocio

Wien I. Neue Burg, Heldenplatz

Esperanto-Prüfungen

beginnen am 6. Nov. um 8 h im Gebäude der **Bundeslehrerinnenbildungsanstalt**, Wien, I. **Hegelgasse** 14. Die mit 1 S Stempel versehenen Gesuche sind bis 18. Oktober bei der Direktion der Prüfungskommission, Wien, I. Burgring 9 (Stadtschulrat) Zimmer 53 einzubringen. Die Prüfungsgebühr von S 20.— bezw. S 10.— ist vor Beginn der Prüfung zu erlegen.

Klagenfurt. Lumbildparolado ĉe Urania la 2 oktobro. **Multe** klopodas s-ano Müllner.

Villach. Lumbildparolado ĉe **Urania** la 3. oktobro.

Voitsberg. La 9. julio okazis la ekzameno de la E-kurso en la knabin-ĉeflernejo, permesita de stiria landa lernejkonsilantaro. Aro da eminentuloj lokaj ĉeestis kaj la ekzameno estis granda kaj bone meritita sukceso de la gvidanto, nia senlaca pironiro Schulrat Schöpfer. „Voitsberg-Köflacher-Wochenblatt" detale raportis pri tio.

Wels: Novefondita grupo. Tre vigle laboras. Aranĝas lumbildparoladon la 5. okt. Detala raporto en nro 10. Imitinda laboro!

Esperanto-Klub hat seine erste grosse Zusammenkunft am 12. Okt. 20 h im Kaffee Siller. Vollzähliges Erscheinen der Mitglieder wird erwartet.

La diakono de pastra seminario en Wien s-ano **Josef Ernst Wildmann** faris la 21. majo dum sankta meso por la esp.-istoj sian unuan predikon La 23, julio li akceptis de kardinalo d-ro Innitzer en la katedralo de S. Stefano la pastrigan ceremonion. — Kiel primicianto li faris sian unuan mesoferon la 30. julio en la preĝejo Sa Anna en Baumgarten. Elkore gratulas KUE-Wien.

S-ano Otto Adrian Scholbert, sacerdoto laŭ la destino de Sinjoro, faris en Timisoara sian unuan mesoferon la 20. aŭgusto. Sian sacerdotiĝon P. Scholbert anoncis ankaŭ en Esp Koran gratulon!

Interlanda vizito. La 24. junio, Esperantistoj el Bratislava kaj Trnava kaj el Wien veturis per ŝipo al Hamburg pro interlanda renkontiĝo. Atendis ilin s-anoj el Hainburg. Post vizito de Hainburg ili promenadis al D.-Altenburg, por rigardi la romanan arenon. Ĉeestis prez. de ĈAE prof. d-ro Kamaryt, s-ano Wanitsek, prof. d-ro Jukl, Barta Csader ktp. kaj prez. de AEA reg. kons. Steiner, vicprez. kalk. kons. Frey ktp.

Koran kondolencon al nia s-ano instr. J. Wiesböck, Schattendorf, pro la morto de lia patrino Maria Wiesböck.

Gustav Georg Linser, tekn kons. en Klosterneuburg, iama kasisto kaj fervora kunlaboranto de KUE-Wien, mortis 13. julio 70-jara. Kondolencon al la familio.

Al la gesamideanoj!

Ni aranĝis novan varbmetodon!

Aro da firmoj deklaris sin pretaj fiksigi sur elpendejfenestro belan verdan stelon kun enskribo „Esperanto", kio signifu, ke la firmo estas „Liveranto de la esperantistoj". Montru iun Esp-membrokarton! En kelkaj magazenoj rabato. Post 3 semajnoj la vitraj steloj estos fiksataj. Listo de „liverantoj" aperos aparte. Sed **jam nun aĉetu** ĉe jenaj firmoj:

Camillo Christian, I. Hofburg-Passage; tabakvendejo.

Herder & Co., I. Wollzeile 33; librovendejo kaj magazeno por presartaĵoj.

Hotel Schweizerhof, I. Bauernmarkt 22; bonburĝa, moderaj prezoj (5% rabato)

J. Heinr. Ita, I. Graben 18; ĉapeloj kaj sportartikoj (10% rabato)

Kaffee Sitter, I Laurenzerberg 4 (E-Klubo ĉiujn 2. kaj 4. ĵaŭdon, vesp. je 20 h)

Fritz Schätzle I. Augustinerstr. 8; vojaĝvalizoj, ledaĵoj.

Tabaktrafik, I. Rotenturmstraße 14; tabakvendejo.

Hans Schlossnickel, II. Volkswehrplatz 19 kaj II. Heinestraße 5; magazenoj, teksaĵoj.

Koczanderle & Potuznik, III. Hauptstr. 16; kaŭĉukvaroj kaj ŝtrumpoj, sportartikloj.

„Maly", III. Hauptstr 22; konfekcio por sinjorinaj roboj.

Hotel Kaiserhof, IV. Frankenbergg 10; bonburĝa, moderaj prezoj (10% rabato).

A. Herzmansky, VI. Mariahilferstraße 26; spezialmagazenoj por silkŝtofoj, modaĵoj tapiŝoj ktp.

Wilhelm Pohl, VI. Mariahilferstr 5; sportartikloj kaj ludiloj.

Hans Scholz VII Mariahilferstr. 100; ilaro por hejmo kaj kuirejo; Wien-aj memoraĵoj (3% rabato).

J. Sauer, XIII. Linzerstr. 105; hotelo kaj restoracio.

Estona Jubilea Kantfesto, kiu okazis en Tallinn, montris la gravan laboron, kiun faris E. En la Komitaton de la Kantfesto oni ankaŭ invitis reprezentanton de la tre vigla Esperanta Turista Komisiono. Tiu ĉi eldonis apartajn poŝtkartojn kun bildoj kaj E-tekston, dissendis ankaŭ pere de ICK cirkulerojn al Tutmondo kaj ricevis multajn gazeteltranĉaĵojn el diversaj landoj pri Estonio. Per Radio oni invitis pere de Esperanto al la festo. En la Informa Oficejo inter 9 oficistoj estis 7 esp-istoj. Estis eldonita gvidlibro en angla, Esperanto kaj germana lingvoj. En la korespondaĵo Esperanto estis inter ĉiuj lingvoj plej multe uzata. Dum la koncertoj Radio-raportado okazis nur en estona kaj Esperanto lingvoj. Samtempe okazis ankaŭ „Interbalta Esperantista Renkontiĝo". Imitinda laboro!

Bulgarujo: Najdem. Srebrekov, **Stanimaka**, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn ĉiulandan.

Kunvenoj de esperantistoj.

Zusammenkünfte der Esperantisten.

Baden: N. Pronay, Bahngasse 2.

Braunau a. I.; Haselbauer, Linzerstr 7/II.

Graz.

E-Verein für Steiermark, Schönaugasse 6/II, Heim: Bürgergasse 4, Fr (v) 20-23 h.

E-Verein „Em. Peltier", Sackstr. 16/II, Mo (l) 20 h.

Gr. Siegharts: Portier Novotny, Fabrik.

Innsbruck: Hotel Grüner Baum, Museumstr. 35, Do (j), 20 h.

Klagenfurt: Elektrizitätswerke.

Linz: Gasthaus Stadtgut, Volksgartenstraße.

Salzburg:

E-Grupo: Gastejo Schwarzes Rössel, Berggasse, Mi (mk) 20 h.

E-Grupo „Estonteco", prez. Kapus, Dreifaltigkeitsgasse 14.

Sigmundsherberg: Schule, Fr (v) 20 h.

Steyr: Schlüsselhofstr., Fr. (v.), 20 h.

Wien.

D-ro Sos-Grupo, I. kafejo Kolowratring, Schubertring 2 Fr. (v.) 19 h.

E-Org. de Oficnavantoj, IV. Schäffergasse 3, Mag. Bez.-Amt, ĉiutage escepte sabate; 19 h.

Esp.-societo „Fideleco", Café Zoglmann, XVIII., Staudgasse 1, Di (m), 16-19 h.

Koloman Kalocsay-Grupo ĉe s-ro Hovorka, IX. Löblichgasse 3, Mi (mk) 19 h.

Libera E-Rondo „Verda Angulo", kafejo Hrdy, XVI. Ottakringerstr. 119: Mi (mk) 20-22 h

E-Rondo „Kolonelo Zwach" ĉe Stafa, VII. Mariahilferstr. 120 Di (m), 16-18 h.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Freyung 6 (Schottenpfarrkanzlei) Mi (mk) 18—20 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.